

LA NOKTO

S. Adamo
Esperantigo: Emanuele Rovere

Pri vi ne pensas mi dumtage, sed nokte mi malbenas vin
kaj, kiam fine matenruĝas, ĉirkaŭas nur malpleno min.

La bildo via grandas nokte, sed vane strebas mi ĝin kapti,
vi amuziĝas min turmenti: vi, nokte, frenezigas min.

La nokto frenezigas min, frenezigas min.

Pervoĉe ŝiras vi l'mallumon, kie vin serĉi mi ne scias,
mi aŭdas vin, l'esper' revivas kaj vin mi amas ĉiam pli.

Vi reaperas dum tempero, flugtuŝas min, etendas manon,
sed mia sango glaciigigas kiam ridante vi forfuĝas.

La nokto frenezigas min, frenezigas min.

La tago brilas pacoplana, kaj via bildo vaporiĝas.

Ĉu vi atingas iun alian? La duboj frenezigas min.

La nokto frenezigas min, frenezigas min, frenezigas min!